

Stabileco de nia lingvo tre gravas, kiel rekonis la fruaj Esperantistoj kiuj konceptis la neceson de neŝanĝebla fundamento.

En la ĉefartikolo de *Trefo*, numero 4a, vi parolis pri „xskribo, fusxskribo”. Kiel vi, mi abomenas uzon de la litero ‚x’ en Esperanto, kaj plejparte mi rifuzas legi tian tekston. Ikso-kodo estas por maŝinoj, ne por homoj. Se homoj deziras legi en Esperanto tekston kiu estas enkodita per iksoj, ili unue Esperantigu ĝin. Ĉiu moderna tekstigilo povas tion fari en nur ono de sekundo.

En la komputoro estas nur nombroj, kaj ĉiu litero estas nur duaria (binara) nombro. Ekzemple, se oni uzas la tekstigilon Ĉapelilo, la litero ‚ĝ’ estas 224 dekarie aŭ decimale (aŭ 11111000 duarie), kvankam aliaj programoj uzas aliajn kodojn. La litero ‚i’ estas nombro 105 dekarie aŭ 01101001 duarie. Rimarku, ke ĉi tie ĉiu nombro havas 8 bitojn (tio estas, 8 nulojn kaj/aŭ unuojn por ĉiu nombro.) Do, la vorto ‚ĝi’ estas 1111100001101001 (kodo kiun mi ankaŭ rifuzas legi – por tio ni havas maŝinojn). Multaj programoj jam povas sendi tiajn literojn rekte trans la elektronika reto, de unu maŝino al alia. Ni neniam eĉ vidas la kodojn.

Tamen, la elektronika reto estas ankoraŭ juna. Ĝis nun, en la plej ofta kaj simpla metodo por sendi literojn, nombroj super 128 estas nepermesataj. Do oni povas fari la taskon per nur 7 bitoj. Pro tio, kiam litero estas nombro pli granda ol 128, oni sendas duoblan literon. Mi sendas ‚g^’-n. Homoj kiuj nun revizias P.I.V. sendas ‚^g’-n. Homoj ĉe U.E.A. sendas ‚gh’-n. Aliaj homoj sendas ‚gx’-n. Fakte ne multe gravas, ĉar maŝinoj ĉe alia ekstremaĵo de la drato povas facile elkodigi. Ne multe gravas, ĉu oni sendas nombron:

1101110	1011110	1101001	{g^i}	aŭ
1011110	1101110	1101001	{^gi}	aŭ
1101110	1101111	1101001	{ghi}	aŭ
1101110	1111000	1101001	{gxi}	

La maŝinoj facile legas kaj manipulas ĉiujn kodojn, kaj ni havas programojn por legi kaj presi esperantbele la vorton: ‚ĝi’. Esperantistoj tute ne devas legi la kodojn, ĉu duariajn, ĉu duoblaliterajn.

Eĉ la bagatela problemo pri duoblaj literoj estas nur provizora. Jam multaj programoj faras ĉion, kaj la uzanto tute ne devas eĉ pensi pri nurmaŝinaj aferoj. Baldaŭ (post dek jaroj) unikodo (16-bita kodo) fariĝos la normo kaj ni povos per ĝi facile sendi ĉiujn eblajn kromsignitajn literojn (kaj ankaŭ milojn da nelatinaj skribsignoj). Mi esperas, ke ni ne devas ŝanĝi la ortografion de Esperanto nur por komplezi dum kelkaj jaroj la elektronikan reton.

Do, mia nekompreno restas. Kial vi deziras ŝanĝi la aspekton de nia presita lingvo? D-ro Albault, vi estas unu el la plej eminentaj kaj respektataj homoj en Esperantujo. Vi estis akademiano kaj Prezidanto de la Akademio de Esperanto. Vi faris multe por Esperanto, kaj la historio rekonos vian grandan kontribuon al nia lingvo. Estas mistero al mi, ke vi nun proponas tute nenecesan reformon.

D-ro Zamenhof kreis por ni belan lingvon kun bela alfabeto. Kial oni dezirus ŝanĝi ĝin?

Respektplene,

Steĉjo Norvell

ELTIRAĴOJ POR MONTRI LA ASPEKTON DE LA NOVA HELP-ALFABETO

[Eble kelkaj inter ni demandas al si mem pri kio temas. Jen gusteto de la verkado de D-ro André Albault en *Trefo*, Bulteno de TRENHA (TRadicia Esperanto, Nova Help-Alfabeto), n-ro 4, Somero-Aŭtuno 2000) por klarigi tion.]

Facila taypado: Pluraj el ni rimarkis, ke pli facilas taypi lau NHA (Nova Help-Alfabeto). Similan senton pri relativa facileco taypi raportis profesiaj taypistoy okaze de sensigna taypado de la Franca.

Pri la Franca: En tiu lingvo ekzistas du supersignoy (circonflekso kaj tremao), aperantay sur chiu el la kvin vokaloj. La Francay skribmashinoy dedichas al ili ambau unu „mortan klavon”.

Internet kutimigis Francoyn taypi sensupersigne. Sed char tiuy supersignoy estas lukso, tio ne jenas, escepte por la ‚é’. La aliaj estas balasto. Pro tio oni kutimijas al pli simpla skribo kay tiu pli simpla skribo ekdisvastijas ech ekster Internet! Pli simpla kay pli facila, char oni ne hezitas por meti au ne meti ian supersignon au alian!

Pri Esperanto: Ni nun ekzamenu la kazon de Esperanto. Char la kvin chapelliteroy estas specife Esperantay, chiu mashino uzos por ilin aperigi iuyn funkciajn klavoyn, krom en apartay kazoy kiel en la Francay mashinoy.

Tamen se oni uzos la NHA, estos iom malsame. Anstatau la supersignitay literoy estos uzatay au simply literoy (ĝ = j; j = y, kaj ankau ŭ = u, en aŭ = au; sed ŭ = w en ŭa) au iuy digramoy (ĉ = ch; ŝ = sh; ĵ = zh; ĥ = kh).

La simply literoy necesigos la saman au nur la duonon kvanton de klavimoy.

1. La literoy kun kromsignoy havas kodoyn; sed tiuj kodoj sur Yapano riceva komputilo aperigos ideogramoy (Informo de J.D.). 2. „imo” sufikso por unufoya ago; vipimo = unu sola vipo-bato; klavimo = unuklava frapo)

— André ALBAULT, 2000 08 15

TROVITA EN INTERRETO (tradukita el la angla)

Ho! ... valoras la penon atenti al tiuj etaj supersignoy ... la francajn verbojn „fiŝkapti” kaj „peki” oni same literumas, sed kun malsamaj supersignoy (kaj tial ete malsamaj prononcmanieroj). Do, jen mi, gaje babilanta kun afabla franca gastiganto, kiam li demandas al mi kion mi ŝatas fari dum la semajnfinoj ... ho ve.

— skribis Linda el Louisiana

